

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture
sociale sans frontières.*



Ĉirkaŭ la kongreso LA NANTA KONVALO



Un produit : le muguet nantais
Unu produkto : la nanta konvalo

Une famille : les maraichers nantais
Unu familio : la nantaj legomistoj

Un jour de vente : le 1er mai
Unu vendo-tago : la 1a de majo

60 millions de brins
60 milionoj da pecoj

200 ha de production
200 ha da produkt-tereno

Une trentaine de producteurs
Trideko da produktantoj

100% de cueillette à la main
100 % da mana plukado

7000 contrats saisonniers pour 300 000 h
7000 laŭsezonaj kontraktoj por 300 000 h

500 000 heures de travail annuel
500 000 labor-horoj jare

80% de la production française
80% de franca produktaĵo

Chiffre d'affaire plus de 15 millions d'euros
Jara enspezo pli ol 15 milionoj da eŭroj

SAT-Amikaro 69a kongreso



Ŝildo de la kongreso.

Laŭ la gazetara dosiero «Le Muguet Nantais» de la federacio de la nantaj legomistoj.

Niavidpunkte, ne tiom indas sin glorigi pro 7000 laŭsezonaj kontraktoj, kio migrigas amason da laboristoj sen solvi kontentige la dung-demandojn....

Vidu artikolon interne p.14-15



K*

Vegane kuiru! Fungopasteĉo

3 supkuleroj da olivoleo
500 g da dispecigitaj fungoj
(ekz.* agarikoj)

1 cepo fajne tranĉita
1 dika ajleroj

2 supkuleroj da timiano
kk* gutoj da citronosuko
60 ml* da porto- aŭ marsala
vino

4 supkuleroj da densa
vegetaja kremo
(anstataŭebla per ĉ.*
100g* da erigita seka
pano)

- pinĉpreno da salo
- pipro freŝe muelita

En oleita pato, kuiru fungojn
kun cepoj, ajlo k timiano,
dum ĉ. 15 minutoj, ĝis ili
estas moligitaj. Surverŝi

citronosukon k* vinon,
daŭrigi kuiradon dum ĉ. 1
minuto. Aldoni kremo (aŭ
panerojn), salon k pipron,
k homogenigi t.e.* dishaki
ĉion plej fajne. Prezenti en
bovilo kun iom da petroselo
aŭ ŝenoprazo post lasi ĝin
iom en malvarmŝranko.

Por pli pasteĉa k malpli
kremeca rezulto, eblas
aldoni erigitajn juglandojn
k malpli fajne dishaki la
preparaĵon.

Frandeblas i.a.* sur rostita
pano kun kukumetoj.

Dishakis

Markovo-Vito 4103

Fotis: Ansofi'

Glosaro pri mallongigoj. En Eaj tekstoj eblas renkonti
mallongigojn. Kelkaj estas oficialaj, aliaj nur kutimaj.
Komencantoj tuj kutimiĝu kun ili :

*ekz. = ekzemple

*kk = kelke / kelkaj

*ml = mililitro

*ĉ. = ĉirkaŭ

*g = gramo

*k = kaj

*t.e. = tio estas

*i.a. = inter aliaj

al ABONKLUBO de Vinilkosmo abonu por 2017!

Tiu ĉi jare, dank'al via subteno al Muzik-
produktado de Vinilkosmo (antaŭmendoj
por la KD de JoMO kaj abonoj al la
ABONKLUBO) nombraj projektoj povis
esti religitaj!

Ĉe vinilkosmo-mp3.com vi povos trovi
ankaŭ la ABONKLUBOn de Vinilkosmo!
Temas pri jara abono al la justa elsendflua
platformo 1D tuŝ kie vi povas auskulti
la plejparton de la bitigita katalogo de
Vinilkosmo sed ankaŭ pli ol milionon da
aliaj verkoj de sendependaj eldonejoj

pere de ĉiuj tipoj de aparatoj (Android/
webapp/retumiloj).

Vi estis pli ol 100 en 2016 kiuj aliĝis al
la ABONKLUBO kaj por venonta jaro ni
esperas ke vi estos pli ol 200 abonantoj!

Ni dankas vin pro via subteno al nia
muzika produktado kaj eldonado pere de
la ABONKLUBO.

Sen vi nenio eblas!

La baza abono al la ABONKLUBO eblas
ekde 10€/jare! (malkovru la diversajn
abonformulojn).



WWW.VINILKOSMO-MP3.COM

Por pli da informoj, abonati aŭ reabonati por
2017 alklaku la ligan:

<http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html>

Vinilkosmo Novaĵoj

Kaj ni havas la
plezuron anonci al vi
ke ĉi jare eblas trovi,
okaze de la SAT-
Amikara Kongreso
dum Pasksemajnfino
en Nantes, la
diskoservon de
Vinilkosmo ĉe kiu Flo
(Floréal Martorell) kaj
Françoise prezentos al
vi ĉiujn muziknovaĵojn
de 2016 kaj 2017.



VKKD 128 «jOmO Okcitanas»

Diversaj aspektoj de la okcitana
kulturo, de sociaj luktoj ĝis la pasio
por rugbeo, tra la tradicioj de vino
kaj karnavaloj kaj la lukto por la
postvivigo de la okcitana lingvo
en gaja, ĝoja, danciga kantoj kies
fontoj troviĝas en tradiciaj okcitanaj
kantoj, tio far **Jomo**, kiun oni ne plu
bezonas prezenti.

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd128&lng=e>



VKKD 130 Sovaĝa animo

En Sovaĝa animo, la potencmetala
bando el Brazilo, BaRok-Projekto, ga-
jnintoj de la 3-a muzikkonkurso de la
revuo Kontakto pritraktas la brazilan
tupian (Indigenan) mitologion en ia
sona rito, kaj ofertas fortajn ripetfra-
zojn, potencan voĉon, pezan muzikon,
kaj allogajn tekstojn.

<http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/hardkoro-punko-alternativa-metal/barok-projekto/2-sova%C4%9Da-animo.html>



VKKD 129 «Bosniumas»

Tiu nova albumo de **Esopo Despo**
liveras sperton surprizan kiu
rezultas el tute nova muzikmaniero
malproksima de ilia kutimo, kune
farita dearo da muzikistoj el malsamaj
landoj kaj muzikhorizontoj. Temas
pri dividita sentemo por muziko
kaj kulturo iukiale malmulte konata
kaj pli-malpli malproksima de la
muzikkulturo de ĉiuj kunlaborantoj.
<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd129&lng=e>

Novajo pri via asocio

Postrestas en la komitato Lucette Échappé kaj Guy Martin. Ĝis la referendumo de junio 2017, ni decidis provizorajn rolojn : Guy kiel prezidanto kaj kasisto kaj Lucette kiel sekretario. Daŭre, kun helpo de skipoj, Veronique Girard respondecas pri libroservo kaj Serge Sire ĉefredaktas La Sago-n.

Por faciligi anstataŭon de la kasisto, eblus dispartigi inter SAT-Amikaranoj la taskojn pri administrado de la kaso kaj pri registrado de aliĝoj. Se ni ne trovos internan taŭgan solvon, ni proponos en kongreso pagi tiun servon.

Ni tre dankas Eric, Régis, Alfa, Jean-Michel, Lucien, Abdel, Gijermo, kiuj proponis sin kaj partoprenis la finan malplenigon de la garaĝo luita en Thiais. De multaj jaroj estis stokitaj en ĝi libroj kaj vortaroj. Ĉifoje, ni multe malpli suferis pro trafikstopiĝo ol dum la unua vojaĝo... La laboro farita en la keloj Philibert Lucot, per Erik kaj Vjeko, faciligis al ni la stokadon de la skatoloj. Dankon plu !

Guy kaj Veronik'

Pri la kongresaliĝilo, kunmetita en la antaŭa numero,

ni ricevis kelkajn rimarkojn/plendojn :

- la ĉefa konsistas en neebleco kontentige plenumi ĝin, pro manko de provizora programo.

Respondo: Pasinte «provizora programo» aperis nur en la januaraj numeroj de La Sago : la ĉijara do ne konsistigas escepton. Plie ni zorgis fruiĝi tiun numeron kun programo iom pli ol provizora (vidu p.4) por ke precize vi havu tempon sufiĉan kaj informojn fidindajn.

- unu alia estis pri laŭŝajne neebleco indiki ke oni dietas vegetarane.

Respondo: Efektive ne estas specifa loko por tion indiki, tamen lastlinie estas indikite : «*Mi havas apartan deziron, kiun mi precizigis dorspaĝe*», kio tute trafe ebligas precizigi vian apartan deziron pri dieto.

La redakcio

P

Enhavo

SAT-Amikaro + Kongreso, Ĉef-artikolo de la komitato	3
Programeroj	3-4
Kongreseto por junuloj	15
Ĉirkaŭ l' kongreso: la Konvalo	1, 4, 15
Nia felietono Misŝuoj (12)	12-13
Ideoj / Rakontoj / Informoj	
Moresneto	5
Stranga ovo...	6-7
Pedagogio	
Kroniko de Mirejo	9
Slipoj	9-10
Libro-servo	8
utilaj informoj	10
Recenzoj	
Libro vivas pli longe...	11
Humuraĵoj-distraĵoj	
Selle-Humuraĵo	4, 7
Tra la fenestro	13, 16
Vegane kuku	2
Te/st/udo \$3	16
Plu moviĝas la Movado -	
Vinilkosmo	2

P

NIVELOJ


Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo:

K = Komencantoj

P = Progresantoj

S = Spertuloj

kun asterisko se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.



LA SAGO.

CPPAP n° 0317 G 86224. ISSN : 1763-1319.

Directeur de la Publication: Serge Sire

Impr. sur papier recyclé par :

L'arbre aux papiers 72100 Le Mans

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto kaj enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Kongresa korespondanto: Lucette Échappé

Redakt-kaj korekt-skipo: Janine kaj Yannick Dumoulin,

Lucette Échappé, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Partoprenis en ĉi numero: Rolando Cuenot, Lucette Échappé (Lumeto), Veronik' Girard, Mirejo Grojean, P. Grolemond', C. Labétaa, Izabel Lamirested', Ĵak LePuil, A. Mateo, Flo Martorell, Ansofi' Markov, Vito Markovo, J. Ravary, Jean Selle, Serĝo Sir'.

Kontribuajoj Contributions

Ĉiam bonvenaj! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues! A – faire parvenir au correspondant de rédaction :

Lucette Échappé (Lumeto)

Reto: **lasago@free.fr**

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF-, ODT- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata

kun indiko de la fonto

Kongresa programo, ne tute kompleta, tamen iom pli ol provizora...

Karaj legantoj, kia ĝojo -okaze de la kongreso- denove malkovri la specifojn de nia nanta regiono!

Fakte por vi, ni devas repensi ĉiujn eblecojn, ni devas rigardi niajn ĉirkaŭaĵojn tra viaj okuloj (se eblas tion diri). Ekz. : eble ni skribos artikolojn pri «les bacs de Loire à Couéron et Indre» «les salines de Guérande» kaj «le marais de la Brière» ankaŭ eble ni skribos pri la «salikornio» ... Ni havas ankoraŭ tiom por rakonti ! Kaj ankaŭ pri la amikeca etoso kaj la milda

karaktero de nia urbo !... Tamen ni ja ne sanktulas, la prisklaveca monumento tion memorigas al ni.

Ni ne preterlasos elvokadon de «la maison des hommes et des techniques» (domo de l' homoj kaj de l' teknikoj) kaj ankaŭ niajn famajn «machines de l'île» (maŝinoj el l' insulo) larĝe inspiritaj de Jules Verne.

Fine, ja 'stas laborego organizi ĉi kongreson, sed tiom entuziasmiga !

Nia skipo malgrandas, sed ni estas forte

ligitaj, niaj interrilatoj sinceraj kaj ni facile kaj rapide trovas interkonsentajn terenojn.

Jam ni ricevis pozitivajn reagojn.

Kaj okaze de multaj kontaktoj por ĉi preparado, ni plurfoje spertis tre frandindajn renkontiĝojn.

Kaj ĉefe, viaj plezuroj nutros la niajn !

**Do, ĝis baldaŭ
Lumeto échappé
nome de Esperanto-44**

Tago	kiam	kio	far kiu(j)
Sabaton la 15an	09:00	Malfermo de la akceptejo (eĉ por tiuj kiuj alvenos vendredon la 14an vespere)	
	11:30	Oficiala bonvena trinkado ĉe la urbodomo	
	14:30	Debato pri Eŭropo: Kia Eŭropo ?	R. Leleu, M. Provost, P. Dieumegard
		Pri astronomio. Esperanto kiel ilo por scienco.	Patrick Lagrange
		«Malkovraj kursoj» por lokaj enloĝantoj	Stefan Blaevoet
		Ekskurso al Rézé Domego «Le Corbusier» (1)	
	Junular-kongreso: Aktivaĵoj laŭ aĝoj.	Ansofi'a skipo (2)	
20:30	teatraĵo: spektaklo frenezeta, malinteleka, dinamika	Sesaktorina teatr-trupo.	
Dimanĉon la 16an	09:00	Jara membrokunveno : unua kunsido	Kongresanaro
	11:30	Kongresa fotado	
	14:00	Jara membrokunveno : dua kunsido, sub formo de laborgrupoj, unua parto (3)	Animantoj ne jam konataj
	15:30	Jara membrokunveno : dua kunsido, sub formo de laborgrupoj, dua parto (3)	
	17:00	Gustumado de lokaj vinoj	Lokaj vito-kultivistoj
		Finan ve(n)kon celas.... ankaŭ veganoj!	Markovo-Vito 4103
20:30	Hiphopa koncerto/balo	Cyril Poulet (el Pafklik) kun Méline (Drumo)	
Lundon la 17an	09:00	Jara membrokunveno : lasta kunsido, decida kaj konkluda.	Kongresanaro
	14:00	Pri Freinet-movado	Isabelle Nicolas(4)
		Pri Vinilkosmo (vidu artikolon p.2)	Floréal Martorell
		Junular-kongreso: Aktivaĵoj laŭ aĝoj.	Ansofi' (2)
	16:00	Pri astronomio. Esperanto kiel ilo por scienco.	Patrick Lagrange
		Pri la Edikto de Nanto. (5)	André Cherpillod
		Junular-kongreso: Aktivaĵoj laŭ aĝoj.	Ansofi'a skipo (2)
18:00	Ferma renkonto	OKK	
20:30	Koncerto, komuna kantado.	Ĵak LePuil kun Serĝo Sir'(klarneto)	
Mardon la 18an	10:00	Tuttaga ekskurso en Clisson (1)	
		Tuttaga ekskurso en Nanto (1)	
	17:30	Fino	

Notoj:

(1) kies prezo respondas al tikedo por taga transportado.

(2) Vidu p.15. Ansofi' kiu estros skipon de lokaj junaj animantoj. Antaŭvidite, animado per «Rubiks-kubo», komunikado per «skipe» kun ne franclingvaj Esperantistoj, animado ĉe najbara ĉeval-centro.

(3) Nun, 3 temoj estis proponitaj far la komitato : 1: Modifo de la statuto; 2 : administrado de la asocio: komitato kaj administrado. 3: komunikiloj (LaSago, TTTejo...). Se vi havas proponon, tuj informu nin (lasago@free.fr)

4) kiu multe laboris pri ĉi temo kadre de sia eduk-sciencia doktoriĝo, vasta certe estos ŝia traktado.

5) ĉio komenciĝis la 3-an de Oktobro 1517. Iu aŭgustena monaĥo el Erfurto (Germanio) *Martin Luther*, ekribelis kontraŭ la vendado de la indulgencoj : tio estis komerco tre mondana por la Eklezio, sed ne konforma al la spirito de la Evangelio.... La sekvon A. Cherpillod rakontos.

La nanta legomisto, diligenta vartisto de l' konvalo.



Necesas multe da sagaco por regi la konvalan floradon: kiam ĝi fruas, necesas ombro, kiam ĝi malfruas necesas suno.



Ĉi simpla konstato endigas instaladon de plej diversaj kovril-sistemoj:

Plej tradicie, karesko sur framoo...



aŭ tunelo el plasto, ĉu nigra por krei ombron, ĉu travidebla por funkcii kiel forcejo, ĉu maldifane blanka por mildigi la fortajn lumecojn.



Neniun agon sur grundo oni povas meĥanizi, ĉio mane realiĝas. La «konvalistoj» nantaj estas do gravaj dungistoj de laŭsezonaj laboristoj, koncentrigitaj en aprilo.



Ekde 2000 mekanizado de la buked-farado ebligis grandigi la kvanton kaj la diversecon de la produktado...

per aŭtomata kalibrilo...



kaj ĉenstablo, tamen ĉe kiu plu gravas la mana laboro.

Redaktis laŭ la sama ĉikuna «gazetara dosiero» Serĝo Sir' Fotoj el la citita dosiero.



Kongreso de la infanoj Infanaj kreaĵoj en Esperantio



Ĉi tiu estas citita de la...
isto bruzas de la...
KRESKAL...
...



La modelo de la...
citanoj el homoj...
fargi...



La citanoj...
de la...
...



Konkurenci...
la...
...

Dum la **Festa Semajno por infanoj kaj familioj**, en Greziljono, dum la lasta semajno de aŭgusto 2016, estis proponitaj diversaj manlaboroj, banado en lagoj, sportaj aktivajoj kaj Esperanto-kursoj. Tiujn lastajn mi gvidis kun Elizabet'. La ideo estis «preparo por lernejo», do jam prepari la infanojn al baldaŭa rekomenciĝo de la lernejo sed samtempe ebligi al ili amuziĝi per diversaj «instruajludoj» en agrabla etoso.

Unu vesperon, Lucette Lejeau (Vendeo) bele prezentis per japana paperteatro kelkajn rakontojn al atente kaptitaj infanoj. Tio estis okazo malkovri kiel funkcias la japana paperteatro kaj krei novajn rakontojn per vivantaj koloraj bildoj kaj esperantaj frazoj zorgeme konstruataj.

Jen, tiel kaj tiam Ismaël B. produktis tiun rakonton per tiuj desegnoj kaj la akompanantaj tekstoj, kiujn vi povas vidi kaj legi apude.

Ismaël, kiu estis komencanto en Esperanto, bone elturniĝis, kaj el pensis spritan rakonton kiu amuzis la spektantojn dum la adiaŭa vespero.

Ĉiuj partoprenantoj de tiu kurso finfine sukcesis prezenti belajn kaj interesajn rakontojn. Eble ni povos aperigi iliajn verkojn, se la aŭtoroj aŭ iliaj gepatroj povos rete sendi al ni siajn aŭ iliajn desegnojn kaj tekstojn.

Mi proponos la saman aktivajon dum la SAT-Amikara kongreso de la Infanoj, Paske 2017, en Nanto, sabate kaj lunde posttagmeze.

Aliaj aktivajoj kaj aliaj gvidantoj kompreneble ankaŭ estas antaŭviditaj...

Ansofi Markov



Saluton al ĉiuj,
Aĥ, ve, mi perfidis min! Forportita per mia skribilo, mi tro rakontis en mia lasta kroniko? Terure!

Tamen... tamen, mi firme promesis al mi neniam malkaŝi tion al iu ajn, kaj... Ĉu mi tro frandis la vinon de la babilrondo aŭ ĉu mia nekonscio faris al mi malfacilaĵon? Mi tute ne scias.

Sed, do, nun vi scias ke, kelkfoje, mi eliras tra la montrofenestro.

Vi konas Zorro(n), vi konas Batman(on) aŭ Superman(on)...Nu, kiel ili, ankaŭ mi havas superpovegojn! Jes, ja!

Vi ne kredas min, ĉu? Tiel kvieta mi ŝajnas en mia montrofenestro, sed aŭskultu bone.

Nokte aŭ ferie mi, ŝtelece, aliformiĝas... al fumo kaj ŝoviĝas tra la seruro de la kortpordo.

En la korto mi reprenas mian kutiman formon kaj tiam mi iradas promenanta, prefere en turistaj lokoj, sed ankaŭ en metroo, en RERo aŭ eĉ en trajno. Mi ĝoje rigardas, observas, vizitas sed mia ĉefa celo estas helpi malfeliĉajn turistojn kiuj troviĝas perditaj; tiuj kiuj ĉien rigardas kun maltrankvilaj okuloj, tiuj

kiuj angore konsultas sian mapon aŭ poŝkomputilon.

Mi alproksimiĝas afable kaj proponas mian helpon. Unue, ĉiam esperante. Sed, mi devas konfesi ke ofte, por ne diri ĉiam, ne funkcias. Poste mi provas la francan kaj se ankoraŭ ne funkcias, mi uzas la anglan.

Turistoj ĝenerale ŝatas mian intervenon kaj mi profitas de ilia bona inklino por iomete paroli plu pri Esperanto. Se mi havas dokumentojn kun mi, mi donas kelkajn. Kelkfoje, por montri kiel Esperanto povas doni forton, kiel Hulk (ĉu vi memoras pri li?), mi iĝas verda kaj mi duoble ŝvelas antaŭ ili...sed ne tro longatempe por ne tro teruri ilin kaj por ankaŭ montri ke Esperantisto estas pacema, mi faras rideton al ili.

Mi adiaŭas ilin ĝentile kaj mi reiras ĝis Bd. Vincento Aŭriol'; tre serioze mi tajpas la kodon por eniri la korton, mi rigardas ĉu mi estas sola, mi aliformiĝas al fumo, ŝoviĝas tra la seruro kaj diskrete instaligiĝas en mian montrofenestron kie vi povos vidi min kiam vi trapasos tien-ĉi.

Ĝis, Dzeka

Lingva helpkadro p.13

transsendis Izabel' Lamirested'.

Testudo
pseŭdosciencia
Bilda Delirajo
\$03 far Sir'

P*

Tio okazis dum nokto*-
festo, kiel nun... Ĉeestis
multege da homoj...

... Kio 'stas tio?

Tio estas
mia filo!

Via filo!?!?...Diable!
Ĉu la patro estas tie ĉi?

Ŝatus mi
vidi lin!

Mi ne scias...

Vi ne scias!?!?...

...Fakte,
mi
kvazaŭ
ne konas
lin ...

Kaj plie, la vespera*
temo postulis kostumojn
kaj maskojn....

...Mallumegis dum bruadis
kapturman* muzikon...

Kaj eble, mi
iomete tro plenigis
mian glason....

Ĉu mi estas tuj
trafonta la misteron
de mia naskiĝo?

...pli
ĝuste,
ĝin mal-
plenigis...

*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.

* Kapturman = kio igas la kapon turniĝi = étourdissant.

* Nokto = nuit; Vespero = soir. Fakte la temo postulas kostumojn kaj maskojn nur dum la vespero. Poste, kiam noktas, nenio plu nepras...